# INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

**Numero 225** **Januaro, 2005**

**Laborantoj:**

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto



Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## PRIPENSU VENI AL LA ESPERANTO-KURSARO

### Vi vivos dum tri semajnoj en Esperantujo en la verdaj montoj de Vermonto

De la 4a ĝis la 22a de julio, 2005, okazos la 36a ĉiujara Nord-Amerika Somera Esperanto-Instituto, ofte nomata Nord-Amerika Somera Kursaro aŭ NASK. Tiu ĉi kursaro estas konata kiel unu el la elstaraj lernejoj de Esperanto en la mondo. Kaj studantoj kaj instruistoj venas el pluraj landoj. Ne estas alia lingvo ol Esperanto en la klasĉambroj, en la manĝoĉambro, en la koridoroj, dum la vesperaj sesioj, dum la semajnfinaj ekskursoj.

La loko de la kursaro estos la Lernejo por Internacia Trejnado (School for International Training — SIT) ĉe la rando de la urbeto Brattleboro, en la ŝtato Vermont, en la nord-orienta parto de Usono. Tiu Lernejo estas mondfama por pretigi studantojn labori en aliaj landoj. La celoj de la lernejo multe kongruas kun la internacieco de Esperanto. Aldona avantaĝo de tiu lernejo estas ties loko en la bildigindaj Verdaj Montoj, tiel nomataj ĉar la montoj estas kovritaj per arboj.

La studantoj kutime dividiĝas en tri nivelojn. La baza klaso kaj la supera klaso kunvenas en la mateno kaj la meza klaso kunvenas en la posttagmezo. Tiel, studanto povas ne nur partopreni en la propra nivelo, sed ankaŭ viziti apudajn nivelojn, laŭvole.

Ĉi-jare la ĉefinstruisto estos Lee Miller, de la ŝtato Missouri en Usono. Li jam instruis plurfoje ĉe NASK; li ja estas bravulo, kaj li bone scias sian taskon.

Interese, lia profesio estas instruado de la Nord-Amerika gesto-lingvo. Dua instruisto estos Birke Dockhorn de Berlino kiu priskribas sin kiel „koreologino”. Ŝi nuntempe instruas la germanan en Seulo kaj perfektigas sian regon de la korea lingvo. Tria instruisto estos Paul Gubbins de Anglio. Li estas brita verkisto (kunaŭtoro de la vidbenda kurso, ***Pasporto al la Tuta Mondo***) kiu jam instruis ĉe NASK kaj plurfoje ĉe la ĉiujara Esperanto-kurso en Barlaston, Britio. Estos ankaŭ speciala seminario pri gramatiko, kiun gvidos Bertil Wennergren, svedo, Akademiano, kaj aŭtoro de ***Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko***.

La kosto de la kurso (el kiu vi gajnos tri akademiajn kreditojn) estas 995 usonaj dolaroj. La kosto por loĝado (en dupersona ĉambro) kaj tri manĝoj ĉiutage estas 700 usonaj dolaroj. Stipendioj estas haveblaj; skribu en Esperanto pri viaj Esperanto-historio kaj aktivoj al la direktoro, Ellen M. Eddy ĉe 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia, WA 98512, Usono aŭ rete: <eddyellen@aol.com>. Telefono: 360-754-4563. Telekopiilo (Fax): 360-786-9175.

En la vesperoj kaj semajnfinoj estos kulturaj aferoj: prezento de informo kaj elmontro de aĵoj de lando de unu el la studantoj, lumbildoj kaj vidbendoj pri landoj kaj Esperanto, diskutoj, kantado, poezio, ludoj, piknikoj, ekskursoj, ktp. Se vi deziras proponi ion, nur skribu al Ellen Eddy.

Grava trajto de la kursaro, miaopinie, estas la ĉiutaga eldono kaj distribuo de bulteno, „NASKa Fasko”. En tiu troviĝas ne nur informo pri la kursaro kaj aferoj ĉe SIT kaj en Brattleboro, sed ankaŭ verkoj, ofte bonkvalitaj, fare de la instruistoj kaj studantoj. Oni instigas la studantojn verki kaj aperigi ion, kaj bona redaktoro helpas eviti lingvajn erarojn.

La Esperanto-kursaron fondis Cathy Schulze en la jaro 1970. Dum multaj jaroj la kursoj situis en SanFrancisko. William Auld instruis en la unua jaro, kaj post tiam la instruistoj konsistis el preskaŭ la tuta ***Kiu estas Kiu*** de Esperantujo. Generacioj de Esperantistoj lernis kaj poluris siajn lingvo-lertojn tie. En la jaro 2002 la kursaro translokiĝis al Brattleboro, Vermont.

Mi unuafoje partoprenis en la kursaro en la jaro 1987, kiam mi povis apenaŭ paroli aŭ kompreni la lingvon parolatan. Mi ne povas precize nombri, sed mi supozas ke mi ĉeestis eble 12-foje, 13-foje. Mi ĉiam ĝuis kaj sentis min en Esperantujo. En la tut-Esperanta medio oni komencas vere pensi en Esperanto. Mi ĉiam multe lernis. Kaj mi gajnis multajn amikojn. — Steĉjo

**[Ĝisdata informo pri NASK, en kaj la angla kaj Esperanto, ĉe http://esperanto.org/nask/]**

# TOKSIKODENDRO: NE TUŜU MIN!

„Venena hedero” kaj „venena kverko” estas la vulgaraj nomoj de du plantoj en la familio anakardio, kiuj kapablas kaŭzi alergian reagon en persono kiu jam sentiviĝis al ili. La venenaj „hedero” kaj „kverko” estas variantoj de unu specio, kun iom malsamaj foliformoj. Ambaŭ estas lignecaj plurjaraj plantoj kiuj kreskas laŭ vojoj, en vepraroj, en heĝoj, kaj en arboj. Unu aŭ la alia troviĝas ĉie en Usono kaj Kanado. Ili povas kreski grimpe sur arboj ĝis granda alto, aŭ kiel arbustetoj, aŭ sur la tero en arbaroj aŭ kampoj. Ili havas folietojn kiuj kreskas triope, kaj malgrandajn blankajn berojn en la somero kaj aŭtuno.



Ŝajne mankas kutima nomo en Esperanto por tiuj plantoj. Ili tute ne estas „hedero” aŭ „kverko”. Pro la botanika nomo (Toxicodenron radicans), mi proponas la nomon „toksikodendro”.

En la suko de la plantoj troviĝas rezino kiu kaŭzas sentiviĝan reagon en preskaŭ ĉiuj homoj post la unua kontakto. Sufiĉas nur leĝere tuŝi la folion aŭ tigon. Hejmbestoj, vestoj, aŭ iloj povas porti la rezinon. Se oni bruligas la plantojn, eĉ en la fumo povas esti rezino.

Post la unua sentiviĝo, dua aŭ postaj kontaktoj rezultigas la tipan reagon de „venenigo”. Kelkajn horojn post kontakto la haŭto ruĝiĝas kaj komencas juki. Haŭtaj veziketoj aperas, ofte en strioj kiuj montras precize kie oni tuŝis la planton. La reago malaperas post unu ĝis kvar semajnoj, eĉ sen kuracaj rimedoj. Oni bezonas kuraciston nur se la jukado estas intensa, aŭ se la inflamo okazas en la okuloj (aŭ aliaj delikataj korpopartoj... eble ni ne diskutu tiajn detalojn publike). Oni ne gratu; tio plilongigas la tempon por resaniĝi, povas rezultigi infekton, kaj povas ŝmiri la rezinon al aliaj lokoj sur la haŭto. Post hazarda kontakto, oni povas forte lavi la haŭton per sapo kaj ofte forigi la rezinon, almenaŭ parte.

— Lee Miller, ***NASKa Fasko***, 2004

**[Informoj el enciklopedio *Encarta*. Foto el enciklopedio *Vikipedio*.]**

## ESPERANTO EN BELA KROATIO

Hodiaŭ la 8-an de julio,
okazos prelego pri Kroatio.

Turismo, organizo kaj kulturo
tradukoj, teatraĵo kaj literaturo.

La maro, Zagrebo kaj kasteloj
belegaj panoramoj en pasteloj.

Plurnuanca laboro de l'Esperantistar'
Ĝis la bela sonĝo de l'homar'

Karaj gespektantoj, venu vi!
Plibeligu vesperon tie ĉi!

— Danijela DRAKULA (de Rumanio), ***NASKa Fasko***, 2004

**[Tiel ŝi invitis la studantojn ĉe NASK al vespera programo pri Kroatio.]**

## STRANGA SONĜO

Do, lastan nokton mi decidis ke mi intencas sonĝi en la Esperanta lingvo. Antaŭ ol mi ekdormis, mi pensis en Esperanto pri Esperanto... En mia menso, mi nomis ĉiun parton de mia korpo, mi nomis ĉion en la ĉambro, mi nomis ĉion en la tuta loĝejo. Mi ekdormis, kaj sonĝis en la *franca*! Nekredeble, ĉar mi tute ne komprenas la francan!

— Kayleen Elcich, ***NASKa Fasko***, 2004

## MALFRUECO

"Pli bone malfrue ol neniam" insistas eĉ viaj impoŝtaj instancoj. Pro la terura malfrueco de ĉi tiu numero de INTER NI respondecas nur mi. Iom kontribuas al la kialoj la tohuvabohuo* de mia skribotablo, kaj la malordego de miaj planoj. Tamen, "Prokrastita ne estas perdita". Mi dankas al miaj kontribuantoj pro ilia helpo, kaj mi petas denove vian pardonon.

— Bob Williamson

***Laŭ *P.I.V.*, "plena konfuzo, malordego, laŭ la hebrea vorto en *Genezo* I, 2.**